PENSEO

N-ro 298

aŭg. / 2016

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 27-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Anteo (Ĉinujo)



kio okazas?

birdoj havas gripon kaj infektas homojn.
rabistoj avidas poŝojn de aliaj
sed neglektas sian liton bombigitan.
sismo! ekster mapoj la geologiaj...

**unu specialisto diris antaŭ 5 jaroj, ke tie ne plu okazos tertremo en 4000 jaroj, kaj alia specialisto diris samtempe, ke tie nepre reokazos tertremo post nelonge... sed al ili oni egale donis nenian atenton krom mono kaj altaj rangoj. nur beboj scias ke arkeo ĉiam necesas.*

2013.04.22

fantazio

amaso da mevoj flugante prezentas
dulingve la nomon ŝimintan ĉe pado.
sidante, mi gapas al mia mi en la
stereovideo. starigô. paŝado...

2013.05.30

arbo rezignacia

timante ke vento tenera samkiel pantero
pumpile eltiros radikon la barban el tero,
li kaŝis sin inter la rokoj en valo graseta.
sed akvo ŝtelvenis, ĝin voris sangviva kun
ŝelo.



2013.05.18

vespere

englutis sunon malsata foko.
steloj ekfalas en la ondmaron.
mi sentas koran jukon sur roko;
la fingroj gratas nur la hararon.

2013.05. 6

Rustam Karapetjan (Rusio)



Fingroj laciĝis tremi

Fingroj laciĝis tremi
Sed plifortiĝis prem'.
Gutis malluma ĝemo,
Fluis de haŭt' hontem'.
Maro ne havas nomon,
Ondojn ĝi ludas nur.
Jen nia naŭa ondo
Flugas jam tra obskur'.

Baptos nin sen subvesto
Sorto kun ironi'.
Kiu vi, kiu estas?
Kaj kiu estas ni?

Tempo kiel doktoro

Tempo kiel doktoro:
Se turmentas nin lez'
Temp' kuracas doloron
Nian per anestez'.

Sed renkontas subite
Bagatelon memor',

Kaj denove perfide
Nin dronigas dolor'.

Salt' en akvon jarcentan,
Arda tondro de plaŭd',
Rond' laŭ akvoebeno
Kaj malglata silento.
Ĝis sekvanta mort-salt'.



Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Fantazio

Al Bertilo Wennergren

Lastan klason en NASK.
Tra la verda aero,
dancas lumaj vorteroj,
kiel feinoj pacaj.

La magia ĉapelo
sur la tablo dormetas...
Sed tute ne atendite
Bertilo diras gracie:
"Mi ŝvebas super la ter'!"

Kaj flokoj el feliĉo
milde falas sur nin,
kiel sopira vual'...
Jenas mondo reala!



Juiz de Fora, 17/07/2016.

Cezar (Germanujo)



Ruinosorĉo

Se floras la ruinokult',
okulto — kaj sopirostult',
se ravas la natur' dum horo
kaj arboj gapas kun fervoro,

se ĥoro kantas sur la tur'
pri am' kaj kavaliroj nur,
se inoj sur kanonoj ridas
kaj aciduloj rande sidas,

kaj tie estas eĉ gastej'
bier' kaj mia ina fe',
mi ĝuas tion, manĝas lante,
kaj pensas, ke mi estas Dante.

Se mia kara kun fier'
laŭ ŝia propra manier'
min plena de amem' rigardas,
kaj kandelingoj en ŝi ardas,

mi diras tuj kun pret' al ŝi:
„Ho, kara, kia harmoni'!
La mondo estu do ruino,
kaj vi por mi la burgfraŭlino!"


Ŝi ne komprenas: „Ĉu ruin'?!
Sed poste tamen kaptas ĝin:
„Se restos nur ruin' ĉe l' fino,
mi estu via burgedzino!"

Se vi ekaŭdos la triladon de
kantobirdoj,
observu ilin
kaj iliajn amikojn,
la nubojn.

Flugu kun ili
en via fantazio,
kun via forgesita sopiro,

tute sen hasto.

Ŭel Roŝa (Brazilo)



Banantorto

Iom antaŭ vespero ,
sen iu ajn despero
nek penso pri morto ,
varman kafon en taso
mi trinkis , kaj kun la klaso
de banan’ en bela torto .



Takashi Ito (Jananujo)



Somera nubo

la sepa de julio ...
mi skribu vorton “stelo”
sur la ĉielo

matena lumo ...
araneaĵo plena
je pluvo-gutoj


cikadoj ĉirpas ...
la radoj de la sono
ruliĝas al mi

eta banano ...
flava ekzistado en
la makrokosmo

somera nubo ...
superstaras urbeton
jen dinosaŭro



Elsa Sylivie Marinelli (Usono)



La granda Sorto...

En Lumo, en mallumo
Niaj celoj kuras kune,
Kiel Pegaso en Grekio
Kunportas l’Amon glore.
Oni sin sentas geĝemeloj
Kiel tempaj getamplanoj
Unu vestas, kiel ombro
Alia estas la sun’ radio.

Oni kuras, oni dormas
Ĉiam al la sorto alvenas
Kaj du amoj ĉielon tuŝas
Ĉar ili du geĝemeloj restas.

30/06/2016

Zara Sarkissianne (Francio)



Eterna Amo

Ni estis junaj, ni estis belaj,
Parolis koroj niaj duopaj
«Tenu mian manon, Ĉesu larmojn»
Vi konsolis min, dirante ke
Mia rigardo surprizigas vin,
Pri aspekto, ke vi punigis min
Tamen vi adoris mian rideton
Petegis ĉiam sekigu larmojn
La plorojn sekvis senĉese
Niaj infan-ridegoj freneze
Kaj kiam ni returnis hejmen,
Sur mia fenestra balustrado
Mi ĉiam trovis rozojn matene
Larĝe fenestron malferminte
Kaj nune dum ĉiuvespere
Niaj koroj komunikas letere
Certe, ke nia amo Eterniĝas
Per densa sento ni denove enamiĝas

08/06/2016

Abbas Kiarostami

Omaĝe al la forpaso de Majstro Abbas Kiarostami, Irana mondfama reĝisoro, verkisto kaj poeto, oni kunvenis interalie en Romo kaj prezenitis liajn artaĵojn kaj interalie mallongajn poemojn kaj aforismojn. Estas mia honoro ke ĉi tie mi tradukas aforismojn kiujn oni prezentas en tiu ĉi filmeto.

Ulo malantaŭ la muro
kaj ulo ĉi tiu flanke de la muro,
scias nek tiu ulo ne ĉi tiu,
scias nur poeto!

***

Kiam mi havas nenion
en mia poŝo,
mi havas poemon,
kiam mi havas nenion
en mia fridujo,
mi havas poemon,
kiam mi havas nenion
en mia koro
Mi havas NENION!

***

Mi ridetas senkiale,
mi amas senproporcie,
mi vivas senzorge
ekde kelka tempo.

***

Hodiaŭ mi restas hejme
kaj malfermos la pordon al neniu,
sed mankas pordo kaj fenestro
al la hejmo de mia menso,
envenas kaj foriras
amikoj disputemaj
kaj konatoj kverelemaj.

***

Abundas amantoj
kaj abundas amatoj
sed malmultas geamantoj.

***

Li scipovis
nek legi nek skribi
sed diris ion
kion neniam mi legis
nek iu ajn skribis.

***

Kiam vi forestas,
la tagnokto estas 24 horoj,
sed kiam vi ĉeestas,
ĝi estas
Iam malpli, iam pli.

***

En tempesta nokto
virino frapadis la pordon
per pugno kaj piedo,
mi do malfermis la pordon kaj diris al ŝi;
bone, se vi volas foriri, foriru!

***

Arbon mi fotis
ĝi ruĝiĝis,
vi ne kredu!

***

Al arbo
mi esprimas mian estimon,
ĝi faligas folion,
enlble kiel signo de
respondo.

***

Matene mi forlasas la hejmon
juna,
kaj verspere revenas
maljuna
kun miljara melankolio,
la kvar muroj de mia hejmo
ĉirkaŭprenas maljunulon
kiu vekiĝas frumatene
juna!

***

La morton
mi forpelas
en mia sepdek jaraĝa festo
la morto atendas
pacience!

***

El la amaso da
nigre vestitaj funebrantoj

unu ekridis,
mi vidis!

Esperantigis



Mori (Usono)

Saeed Ahmad (Pakistano)



Sentitole

Por serĉi la veron
ni sidis en la boato
de vitro farita
en la roka rivero
Ne povis trovi la veron
Sed la boato en pecoj frakasiĝita
Nia spirito doloris
Terure korpo vundita,
La rivera akvo
Kiu helpis nin
fariĝis ruĝkolorita

kelkfoje
vere
oni ne scias
ke eta avareco
alportas grandegan problemon.
kelkfoje
vere
oni ne scias ke
eta aĉa ago
alportas aĉegan rezulton.
Irante al la ŝtuparo
se vi ne zorgas ŝtupojn
eta malatento povas
rompi vian kruron
kelkfoje
vere
oni ne scias
ke
irante al iu montara vojo
vi turnas al la valo de morto
ŝoforante vian aŭton.
Multfoje ni scias
Kion ni faras?
Kelkfoje, kelkfoje
vere, ni ne scias
kaj multoblan prezon
ni pagas.

Bedri Alimehmeti



La hejmo

En ĉi tiu pordon
Kvankmam malfruas
Vi povas eniri.
Estas ĝi la pordo de la mia hejmo.
Jes, ja, vi povas eniri, diras mi.
Tamen nur je unu kondiĉo.
Ne frapu sur ĝin!
Malfermu la pordon senbrue kaj ….ŝeeet!
Krom min, ĉiuj dormas.
Malfruas!
Ankaŭ miaj poezioj en la tirkestoj
Ekde jaroj dormas.
Atentu, mi petas vin ne veki ilin
Ĉar mi ne scias kian respondon donu,
Kiam ili demandos min:
“Kial vi ne publikigas nin?”
Ne alparolu min.
Mi ne scipovas paroli.
Ne demandu kiel mi nomiĝas.
Mi ne havas nomon.
Sed donu al mi
Nur paperon kaj plumon.



Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO SESA

La plej respektinda instruisto

§06-05

Yan Hui demandis Konfuceon: “Kiam la patrino de Mengsun Cai mortis, tiu, ne afliktita, ploris sen larmoj. Dum la tuta periodo de la funebro li sentis nenian malĝojon. Sed, malgraŭ ĉio ĉi tio, li estis konata kiel la plej bona observanto de la funebrado en la regno Lu. Kiel do li povas akiri tian reputacion, kiu ne respondas al la efektiveco? Mi vere estas konfuzita per tio.”

“Sinjoro Mengsun,” respondis Konfuceo, “estas vere perfekta funebranto, kiu superas tiujn, kiuj konas la funebrajn ritojn. La funebraĵoj devas esti simplaj, sed la ordinaruloj ignoras tion. Li jam sufiĉe ilin simpligis. Li ne scias, kio estas la vivo kaj kio estas la morto. Li preferas nek unu el la du, nek la alian. Li simple sekvas la naturan evoluon kaj estas preta akcepti la nekonatajn okazontaĵojn. Cetere, kiam transformiĝo estas okazonta, kiu do scias, ke ia transformiĝo ankoraŭ ne okazis al li; kaj kiam transformiĝo ne estas okazonta, kiu do scias, ke ia transformiĝo jam okazis al li? Eble vi kaj mi estas en sonĝo, el kiu ni ankoraŭ ne vekiĝis. Por Mengsun ekzistas rimarkeblaj ŝanĝiĝoj en la korpo, sed ekzistas nenia vundo al la menso; la loĝejo de lia spirito ŝanĝiĝas, sed la spirito ne mortas. Mengsun estas la sola, kiu estas en vekiteco. Li ploras tiam, kiam aliaj ploras: li sekvas la cirkonstancojn. Cetere, kiam iu diras ‘mi’, kiu do scias, ke la tiel nomata ‘mi’ ne estas mi mem? Vi povas sonĝi, ke vi estas birdo fluganta al la ĉielo, aŭ ke vi estas fiŝo, kiu naĝas al la profundo. Mi nun parolas, sed mi ne scias, ĉu mi estas en vekiteco aŭ en sonĝo. Ni povas esti en subita ekĝojo tiam, kiam ni ankoraŭ ne havas la pretecon ekridi; ni povas havi la emon plenkore ekridi, sed la okazo ne sin prezentas. Se ni rezignacias al la natura transformiĝo, ni povos eniri en la senliman regnon de la unika Taŭo.”

§06-06

Yi’erzi iris viziti Xu You. Tiu demandis lin:

“Kion la reĝo Yao instruis al vi?”

“La reĝo Yao diris al mi,” respondis Yi’erzi, “ke mi nepre praktiku la humanecon kaj la justecon kaj faru klaran distingon inter la pravo kaj la malpravo.”

“Tiuokaze,” demandis Xu You, “kial do vi venas ĉi tien? La reĝo Yao jam tatuis vin per la humaneco kaj la justeco kaj fortranĉis vian nazon per la pravo kaj la malpravo, kiel do vi povus sencele vagadi sur la vojo de senzorgeco kaj absoluta libero?”

“Kaj tamen,” diris Yi’erzi, “mi volus randiri la vojon.”

“Ne, vi ne povas,” diris Xu You. “Kiam iu estas blinda, li ne povas vidi la belecon de homa vizaĝo, nek aprezi la ĉarmon de buntkolora vesto.”

“La belulino Wuzhuang forgesis sian belecon,” diris Yi’erzi, “la fortegulo Juliang forgesis sian fortecon, la Flava Imperiestro forgesis sian saĝecon, ĉar ili estis nutritaj kaj remulditaj per la Taŭo. Kiel do vi scias, ke la Kreinto ne forigos la tatuaĵon de sur mia frunto, nek riparos mian nazon, tiel ke mi povos havi kompletan korpon kaj sekvos vin kiel mian instruiston?”

“Ho, pri tio mi estas ankoraŭ ne certa.

Sed mi provos doni al vi la jenan skizon:

Ho, mia majstro! Ho, mia majstro!

Li harmoniigas ĉiujn estaĵojn en la mondo,

Sed li faras tion ne por la justeco.

Li etendas sian bonfarojn al mil generacioj,

Sed li faras tion ne por la humaneco.

Li ekestis tie jam antaŭ la tempo nememorebla,

Sed li estas tute ne maljuna.

Li kovras la ĉielon, subtenas la teron,

Kaj skulptas la formojn de ĉiuj estaĵoj,

Sed li ne paradas per siaj potenco kaj lerteco.

Jen estas la vojo, sur kiun vi volas vagadi."

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Nuna diluvo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

El
la nubkovrita ĉiel'
lavangas
akvo kun ribel'.

Ĝi
jen abrupte kun muĝ-kri'
faladas
je homa anksi'.

Flu'
akva torentas kun bru'
dronigas
mondon per detru'.

Jen
domoj, vojoj sur teren'
mergiĝas
en akvon je plen'.

Sur
akvo flosas laŭ plezur'
jen aŭtoj
kaj mebloj en kur'.

Kaj
homoj grupe sur altaĵ'
grundiĝas
kun granda malgaj'.

Ve
tute haltas ludoj de
publiko
senespere tre.

Nu,
sturmboatoj por sukur'
alvenas,
—la arkeoj, ĉu?

**Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimarangĝo a,a,xa (x=senrima)*

Bovo kaj rano

(fablo)

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Ĉe lago
ludis ĝojplene
du ranetoj kaj tiam
alvenis bov' promene
trinki senĝene.

Pro mispaŝ'
mortigis la bov'

unu raneton per huf'.
Alia rano, sen pov',
kuris je ekmov'.

Enhejme
li al ran-patrin'
balbutis spiregante,
"La morto trafis lin,
jen mava destin',

panjo, ve!
Estas la frato
tretmortigita de best'
giganta per hufbato
jen sen kompato!"

Neniam
vidis patrin-ran'
bovon de sia naskiĝ'.
Ŝi do al sia infan'
mimis kun rikan':

"Ĉu tiom
ĝi grandas ronde?"
Ŝi montris sian ventron
la pufigitan onde
kvazaŭ etmonte.

"Ne. Granda
ol via plie!"
Ŝi blovis sian ventron
pli pufa energie
kun brila radi'.

"Ĉu tiom
granda kiel mi?"
"Ne, ne, ne, eĉ pli granda!"
Panjo kvazaŭ kun magi'
faris ventron pli

balone
ronde ĝislime.
Antaŭ ol ŝi demandis,
Pum! krevis ventro fine
kaj rompe kline.

Zhuang Qixiong (Ĉinujo)



Dulingva Ĉinesko

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Han-lingvo,
granda kaj bela.
Antikva ideogram',
patrin-lingvo fidela
en saĝ' ĉiela.

Ĉinesko
brilas kun ĉin-kor'.
Surmetu E-veston kaj
oromos pro verda glor',
al monda trezor'.

**Sopir-al-sudo: ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Klavdija Grebenŝĉik

Eventoj de tiu rakonto okazis en Rusio en dudekaj jaroj de dudeka jarcento.

Jen tia ŝi, tiu Julia!

Ŝi estis kvina infano en familio, gepatroj jam ne atendis ŝian aperon kun tia ĝojo, kun kiu ili atendis naskiĝon de antaŭaj infanoj. Patrino tro okupis sin pri klopodoj kun kvaraj infanoj, kiuj naskiĝis unu post la alia post dek seninfanaj jaroj. Sed, kiel oni parolas, vole aŭ nevole gepatroj devis akcepti novan infanon! Kaj Julia naskiĝis. Bebo estis ĉarma: vizaĝeto estis blanka, sur vangoj estis delikata vangruĝo, haroj estis nigraj, kaj okuloj estis brunaj, helaj kaj radiaj. Ĉiuj tre amis ŝin, konstante tenis ŝin en manoj. Plej aĝa fratino veturigis ŝin laŭ strato en plektita (el dikaj salikaj vergoj) infanĉareto kaj tre fieris, kiam najbaroj kliniĝinte super infano admiris bebon kaj dirante: "Por ne envulti" kraĉis trans

ŝultro.

Pasis kelkaj jaroj, kaj Julia transformiĝis en ĉarma infano kun ruzaj okuloj kaj, kiel parolis plenaĝuloj, kun kudriloj en sidvangoj – ĉie ŝi kuris, pri ĉio ŝi interesiĝis. Ŝi kvietiĝis nur kiam aŭskultis fabelojn. Tiam ŝiaj okuloj brilis pro scivoleco, kaj ŝi malpacience plirapidigis rakontanton: “Sed plu, kio estis plu?” Ŝi kredis ĉiujn sorĉojn kaj miraklojn kaj ankaŭ ekziston de Fajra Birdo, Avo-frosto, Neĝulino kaj tiel plu.

Sed ĉar oni tro dorlotis ŝin, aŭ ĉar ŝi genetike memoris, ke ŝi iam estis nedezirata, do ŝi iĝis sufiĉe ruza kaj malbonkora knabino. Kion tio signifas? Tio signifas, ke Julia tre ŝatis fiagi, trompi kaj fari ĉion malboncele. Foje ŝi enkuris en hejmon kun krio: “Incendio! Incendio!”

– Kio brulas, kie? – ĉiuj ekmaltrankviliĝis.

– Domo de onklino Dusja brulas!

Patro kaj patrino kaptis sitelojn kaj kuris al puto. Sed kiam ili kun plenaj siteloj alkuris al apuda strato, kie estis domo de onklino Dusja, do ekvidis neniun incendion. Kiel oni parolas, ne estis nek fumo nek fajro. Sed post si ili ekaŭdis ridon de Julia.

– Vi estas malbona knabinaĉo! Mi punos ŝin! – patrino ekkoleris.

– Trompantino! Dum mi estas kolera, ne venu al hejmo! – patro kriis.

– Mi ne veturigos vin sur biciklo! – plej aĝa frato Gena promesis.

Sed Julia timis neniun. Iufoje ŝi kaŝiĝis ie kaj fiagis aŭ trompis iun. Ŝi amikis nur kun knaboj kaj nevole imitis iliajn kutimojn. Kelkfoje ŝi vidis, kiel grupo de adoleskoj streĉis maldikan ŝnuron laŭlarĝe trotuaro, kaj preterirantoj alkroĉiĝis, stumblis kaj ridinde svingante brakojn apenaŭ falis ekscitante kontentan ridegon de junaj huliganoj. Kaj Julia ridis kun ili. Tiu afero tre plaĉis al ŝi, kaj ŝi decidis, ke ŝi nepre faros tiun “artifikon”, kiel parolis strataj knaboj, en sia hejmo. Kaj Julia tiel faris, sed ŝi estis pli ruza ol ŝiaj strataj amikoj. Ŝi streĉis maldikan ŝnuron trans tuta ĉambro, alligis ĝiajn pintojn al du seĝoj, kiuj ŝi starigis en diversaj anguloj. Viktimo ĉiam estis unu el fratoj, ja ili moviĝis laŭ ĉambro kure aŭ salte. Ne atendante insidaĵon iu el ili alkroĉiĝis per piedo pro ŝnuro, kaj seĝoj kun bruo falis. Komence tiu petolaĵo ekscitis amikan ridon, sed kiam pro ŝnuro alkroĉiĝis kaj apenaŭ falis onklo Ŝmilik, kiu venis al paĉjo Motele mendi ŝrankon, oni kaptis Julian, punis kaj starigis en angulo. Onklo Ŝmilik pro neatendeco akceptis ŝokon, kaj paĉjo Motele apenaŭ perdis bonan klienton. Puno ne helpis, kaj iufoje unu el fratoj venis en lernejon kun ŝnuro aŭ eĉ kun banto, kiujn Julia, akompanante fratojn, alligis al palto. La infanojn mokis samklasanoj, kiuj ĝoje saltis ĉirkaŭ vica viktimo de Julia kaj ridante montris “vosteton” per fingro. Kaj Julia ricevis batojn de fratoj.

Sed tio ne helpis, kaj ĉiuj familianoj ofte punis ŝin. Foje Julia decidis venĝi al ili kaj por tio elpensis vican fiaĵon. Kiam patrino foriris al bazaro, ŝi eniris en kuirejon kaj prenis el ŝranko malnovan aluminian kaserolon, truhavan tekaldronon kaj ĉifitan ladan kruĉon. Ja tiam oni elĵetis nenion. Kial? Sed subite tio taŭgos!

Ŝi alportis tiun vazaron al dormejo kaj metis ĝin sub lito. Poste ŝi kuris al najbaro, onklo Mitja. Li estis tajloro kaj vestis loĝantojn de urbo kaj apudaj vilaĝoj per paltoj kaj jakoj. Ekvidinte antaŭ si Julian onklo Mitja demandis amike ridetante:

– Kion diros, belulino, por kio vi venis?

– Panjo sendis min por demandi, ĉu vi havas firma-firman fadenon? – lerte trompante diris Julia.

– Sed por kio ŝi bezonas forta-fortan fadenon? – ruze mokimitis ŝin onklo Mitja.

– Ŝi volas iri al bazaro por cepo, sed sako ŝiriĝis, kaj ŝi devas fliki ĝin... – daŭrigis fantazii Julia.

– Prenu fadenon kaj portu al panjo! –

onklo Mitja diris, volvis fadenon sur paperaĵon kaj donis ĝin al Julia. Ŝi metis ĝin en poŝon kaj kuris al paĉjo Motele en metiejon, kiu estis en malantaŭa korto de domo, kaj kien oni povis veni el kuirejo. “Paĉjo Metele”, tiel karese kaj estime nomis lin pro lia bonkoreco kaj honesteco ĉiuj: parencoj, konatoj, mendantoj. Li estis lignaĵisto. Li faris bonegan meblon sen najloj per mortezoj, kiel faris lia patro, avo, praavo. Lia meblo estis ne nur bela, sed ankaŭ firma – por jarcentoj... Ofte liaj mendantoj estis novaj sovetiaj burĝoj, kiuj dank’ al NEP rapide aperis kiel fungoj post pluvo. Oni faris por ili ne kutiman meblon sed kun sekretaj tirkestoj, en kiuj riĉaj butikistoj, brigadanoj kaj diversaj komercistoj kaŝis orajn carajn monerojn. Dum tre mallonga tempo entreprenemaj homoj tiel ŝanĝis tiun landon, ke en tiu malsata lando aperis forgesitaj delikataĵoj kaj diversa varo, aperis vendo. Absorbiĝinte pri *geŝeft* (aferoj) tiuj konfidemaj sinjoro-kamaradoj perdis atentemon. Ili ne konjektis, kio okazos kun ili, ne konjektis, ke multajn homojn el ili oni arestos, iliajn domojn kun meblo kaj kaŝita en ĝi oro oni donos al multenombraj ĉefoj kaj iliaj familioj. Plej interese estas, ke ĝis nun en tiu urbo estas famoj, ke tiujn orajn monerojn neniu trovis, tiel lerte faris lignaĵisto Motele tiujn sekretejojn. Ĝenerale tiujn monerojn neniu akiris. Poste estis “tridek tri malfeliĉo”, inkluzive milito, kaj dum tiu milito preskaŭ tuta meblo forbrulis kun domoj. Sed, verŝajne, ia meblo restis, kaj tiam dezirantoj povas komenci serĉojn de trezoroj de tempo de NEP*...

Kiam Julia eniris en metiejon, patro staris je dorso al pordo kaj kun entuziasmo laboris per rabotilo. Ŝi kaŭris kaj kolektis je amaso rabotaĵojn kaj segaĵojn, metis ilin en juprandon kaj elkuris el metiejo nerimarkita.

En dormejo dekstre apud pordo staris granda antikva ŝranko, tiu sama ŝranko, pro kiu suferis onklo Ŝmilik, kiu ekvolis havi ĝuste la tian. Tiu ŝranko estis malhela pro tempo aŭ pro tre malhela lako. Kiam frumatene ŝutroj estis ankoraŭ fermitaj, la ŝranko estis preskaŭ neevidebla en mateniĝa krepusko, kaj vekiĝintaj infanoj kiam rapidis al necesejo ofte puŝiĝis pro ĝi akirante bluaĵojn sur genuoj kaj fruntoj. Tiu ŝranko devos helpi al Julia en ŝia nova fiaĵo.

En tiu vespero, kiel tio ofte okazis, ĉiuj familianoj dissidiĝis ĉirkaŭ tablo por ludi lotludon. Julia iris post dorsoj de ludantoj kaj jen ĉagrenite veis, jen indignis pro tio, ke ili ne invitas ŝin en la ludo. Tio estis ne pro tio, ke ŝi ankoraŭ estis tro juna – ŝi jam povis legi per silaboj kaj dank’ al lotludo komprenis ciferojn. Sed ili volis en vica fojo puni ŝin, ĉar ŝi tedis ĉiujn per siaj fiaĵoj. Dum la ludo Julia konstante trompis ĉiujn. Kiam oni anoncis vican nombron, ŝi kriis: “Ĉe mi, ĉe mi!” Oni kredis ŝin, sed post ioma tempo komenciĝis eraroj. Trompo malkovriĝis, kaj oni elpelis Julian de tablo. Tial en tiu vespero Julia iris ĉirkaŭ tablo kaj pensis: “Nun mi kvitiĝos kun vi, nun!”

Ĉiuj tiel absorbiĝis pri la ludo ke forgesis pri ŝi. Sed ŝi nerimarkeble eniris en dormejon, eltiris el sub lito kaŝitan vazaron, kiun ŝi antaŭe plenigis per rabotaĵoj kaj segaĵoj, kaj komencis aferon. Unu pinto de fadeno ŝi streĉis trans teniloj de kaserolo, tekaldrono kaj kruĉo kaj kunligis ilin. Poste ŝi grimpis sur seĝon kaj kun granda peno – ŝia staturo ankoraŭ estis ne granda – metis tiun vazaron sur ŝrankon. Alian pinton ŝi alligis al vesthokon, kiu estis alnajlita sur interna flanko de pordo.

Ŝi ĝustatempe sukcesis eliri trans nemulte malfermita pordo kaj fermis ĝin post si. Ĝuste en tiu tempo panjo malpligrandigis meĉon de lampo kaj anoncis, ke infanoj devas kuŝiĝi por dormi. Brue flankenigante seĝojn infanoj eliris de tablo kaj ne forgesis turniĝi al Julia kaj montri al ŝi langon. Responde Julia almetis al nazo etenditajn fingrojn de ambaŭ siaj

manoj kaj ridis antaŭe antaŭĝuante estontan eventon. Knaboj ĉirkaŭis lavtablon, laŭ vico malfermis kranon, sed pli multe puŝiĝis kaj ŝpruciĝis ol laviĝis.

– Iru dormi! – panjo komandis kaj forprenis de infanoj viŝtukojn.

Kaj ili kursuperante unu la alian ĵetis sin al dormejo. En pordo ili kiel kutime aranĝis ŝtopbaron. Plej aĝa frato unue alkuris al fermita pordo kaj etendis brakojn ne enlasante fratojn eniri. Okazis batalo por tio, kiu unue eniros al dormejo. En tiu fojo ili ĵetis sin al pordo kune. La pordo subite malfermiĝis, fadeno streĉiĝis kaj tiris suben tekaldronon, kaserolon kaj kruĉon... Ili falis al knaboj ĉirkaŭŝutante ilin per rabotaĵoj kaj segaĵoj. Vazaro deruliĝis de iliaj kapoj kaj ŝultroj, falis plankon sonigante sonoron kaj bruon. Dum unu sekundo estis mallaŭte, sed poste aŭdiĝis krioj de timigitaj knaboj. Ja ili estis ne multe pli aĝaj ol ilia petolema fratino... Pro bruo alkuris aliaj familianoj: panjo, paĉjo kaj plej aĝa fratino. Komence ili povis kompreni nenion: sur planko kun timigitaj vizaĝoj sidas knaboj, super iliaj kapoj flugas rabotaĵoj, pro segaĵoj ĉio estas griza kiel en nebulo, kaj sur planko sonorante kaj tintante ruliĝas vazaro.

Kaj tuj el sub tablo aŭdiĝis ploro de Julia...

– Mia Dio! Kio ĉi tie okazas?! – panjo levis brakojn al plafono.

Patro kaj plej aĝa fratino rigardis al flanko de tablo. Timo de knaboj transformiĝis en ridego, kaj el sub tablo aŭdiĝis ploro de Julio. Ŝi neniel atendis, ke ŝiaj fratoj tiel timos. Ja ŝi volis nur kvitiĝi...

– Ne, tio estas ne infano, tio simple estas huliganino! Mia Dio, kiu el ŝi elkreskos?! – panjo veis ritme frapante sin per manoj al genuoj.

– Nu nun ni punos vin! – plej aĝa frato eniĝis sub tablon kaj eltiris el sub ĝi plorantan Julian.

– Mi... mi... mi plu tiel ne fa-a-aros! – ŝi ploris.

– Bone, – per repaciga voĉo diris paĉjo Motele. – Mi ne batos vin, sed vi faros tion, kion mi ordonos al vi. Ĉu vi komprenas?

Julia kun destinita aspekto kapoklinis.

– Gena! – adresis patro al plej aĝa frato. – Alportu ĉi tien balailon, ŝovelilon kaj vestan broson.

Gena elkuris el ĉambro kaj tuj revenis portante ilojn de puno.

– Nun, – severe ordonis patro, – vi ordigos ĉion, kion ĉi tie vi faris.

Julia ree ekploris sed ekvidinte neelpeteblajn rigardojn de fratoj humile prenis broson kaj balailon. Dum horo ŝi faris ordigon kun peno tenante en malgrandaj manoj dikan balailon.

Post tiu leciono ŝi kvietiĝis sed ne longe. Petolema diableto, kiu sidis en ŝi, ree elstarigis siajn kornetojn, kaj baldaŭ en hejmo ree komencis milito... Kaj tiam fratoj imitante sian tempon, en kiu ili vivis, kolektiĝis por akcepti “verdikton” al Julia...

– Ni devas puni ŝin. Kiu volas diri ion? – severe demandis Gena.

– Hu kion ni devas diri? Ni devas bati ŝin, kaj ĉio! – diris meza frato Alik.

– Sed vi por ŝi estas ne paĉjo, ĉu vi komprenas? Kaj ĝenerale ŝi timas neniun, – diris malplej aĝa frato Miŝa.

– Mi scias, kion ŝi timas.

– Kion? – demandis Alik kaj Miŝa.

– Musojn, ŝi timas musojn! Mi foje vidis, kiel ŝi elkuregis el paĉja metiejo kun tia ploro! Ŝi ekvidis muson kaj tre timegis.

– Ĉu verŝajne vi petos al muso, por ke ĝi timigu Julian? – moke diris Alik.


– Vi estas stultulo! Ni faros muson!

– Ĉu mi estas stultulo? Vi estas stultulo! Li faros muson...

– Bone, mi al vi diros nenion, sed morgaŭ post lernejo vi ekvidos ĉion...

Vespere en sekva tago Gena prenis pecon de ĵurnalo, tordis ĝin kiel malgrandan stringilon kaj bruligis. Ĵurnalo transformiĝis

en malhele griza cindro, kiu efektive estis simila al muso. Atenteme ne spirante, por ke cindro ne disŝutiĝu, Gena metis ĝin en mezo de ĉambro apud tablo. Alik skeptike observis manipuladojn de Gena, kaj Miŝa rigardis malferminte buŝon pro scivoleco.



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

– Sed nun vi devas helpi al mi. Eniĝu sub tablon, kaj kiam Julia venos, kaj mi krios: "Muso!" – blovu al cindro per tutaj fortoj. Ĉu vi komprenis? – knaboj komprenis ĉion kaj ĝoje antaŭĝuante estontan eventon amike eniĝis sub tablon. Kaj tuj aperis Julia.

– Muso, rigardu, muso! – Gena kriis.

– Kie? – time ektremis Julia.

– Jen, jen, apud tablo!

En tiu momento fratoj amike blovis al cindro, kaj ĝi moviĝinte rampis al piedoj de Julia. Ŝi kun krio eksaltis kaj tiel alte ke okazis sur tablo!

– A-a-a! – Julia ploris starante sur tablo kaj frapante per piedoj pro timego. – Elpelu ĝin, mi timas mu-u-uson!

– Bone, ne timu, ĝi jam forkuris. Ĝi alkuris pro vi, volis preni vin al sia truo kiel Colulinon kaj ellasi nenien, por ke vi ne fiagu!

– Ne trompu, tio ne povas okazi, – Julia ploris.

– Kun bonaj knabinoj tio ne povas okazi, sed kun tiuj, kiuj ŝatas fiagi kaj trompi, povas! Ĉu vi fiagos? – severe demandis Gena.

– Ĉu vi fiagos, fiagos? – demandis eliĝintaj el sub tablo Alik kaj Miŝa.

– Ne-e, mi ne fiagos! – en tiufoje solide promesis Julia daŭrigante plori.

De tiu tempo pasis multaj jaroj. El Julia elkreskis nenio malbona, sed fariĝis pompa belulino kun grandaj radiemaj brunaj okuloj, pro kiu duono de knaboj de ŝia lernejo apenaŭ mortigis unu la alian.

Kiam gefratoj jam estis plenaĝuloj kaj renkontiĝis kune, fratoj ridante demandis Julian:

– Kiel vi tiam suprenflugis sur tablon? Ja ĝia alteco estis ĝis via kapo! Nu ankoraŭfoje provu, ĉu verŝajne vi ekpovos?

– Ne, mi ne ekpovos! Mi delonge ne timas musojn, – ridis Julia sed por ĉiu okazo rigardis al planko...

**Nova Ekonomika Politiko. Periodo de relative liberala ekonomiko en Sovetio de 1921 ĝis komenco de tridekaj jaroj.*

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov (Rusio)

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio
Tel: (023) 67095890 (hejme)
Retadreso: vejdo@163.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_